



LA JUNA VIVO

MONATA BAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO”

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Administracio: K. Kranenburg, Steenschuur 10, Leiden, Nederlando

Sekretariejo de TEJO: Juliana van Stolberglaan 9, Naarden, Nederlando

Ĝiro de TEJO Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

Respondo al amikaj leteroj.

Kelkaj anglaj amikoj skribis leterojn, en kiuj ili montras je tio, ke la Estraro ne sufiĉe rapide kaj akurate respondas al la leteroj.

Kvankam ne estas mia intenco defendi la eventuala(j)n kulpulo(j)n, mi petas la eksterlandajn amikojn, ke ili konsideru la trookupitecon de la Estraro. Jam pasintjare en Wörgl ni serĉis, sed ne trovis solvon. El neniu lando estis sufiĉe grandnombraj partoprenantoj por elekti novan estraron. La malnova Estraro deziris forlasi sian postenon, sed kiu anstataŭ ĝin? Ni, pli maljunaj anoj devas helpi kiom eble plej multe en la laborado por TEJO, sed ni devas lasi la gvidadon, la decidon en diversaj aferoj al la junularo mem. La organizo apartenas al la junularo, do devas stari sub ĝia gvidado. Ni nur apogu kaj helpu ilin. Nia kritiko estu konstrua kaj ne detrua. Ni havu

sufiĉe da forto por teni nin sur la fono kaj lasi la junularon esti memstara. Ni helpu nur tiam, kiam ili mem ne scias la ĝustan solvon, ni konsilu nur tiam, kiam ilia labormaniero gvidos probable al pereco. Tro da kritikado estas ĝena kaj forprenas la laboremon de la junularo. Ni venu grandnombre al Hilversumo kaj dum la laborkunsido de la jubilea kongreso ni kolektu niajn fortojn. Nur per komuna laborado ni savos kaj pligrandigos TEJO-n kaj entuziasmigos la gejunulojn.

Samtempe mi montras je tio, ke mi, kiel redaktorino havas nenian estrarfunkcion, mi nur kunlaboras kun la Estraro.

Geamikoj ni komune helpu la gejunulojn por fari TEJO-n granda kaj forta.

E. Burgler-Jezsó.

La plej malgrandaj homoj.

La tuta familio estis unike ĝoja, kiam al miaj bofratino kaj frato naskiĝis filo! Mia frato, kiu estis oku!frape fiera pro tio, kompreneble ĉiun vesperon iris al la akuŝkliniko, kie la patrino kaj bebo restadis. Vespere nur la patroj rajtis eniri la klinikon, sed la kvaran tagon mia frato ne povis veni pro iu kaŭzo. Mia bofratino tiun vesperon do estus sen vizito, se ne

Se ne oni proponis, ke mi anstataŭ la patron pro la fakto, ke mi iom similas al li! Oferema kiel mi estas, mi do faris adekvate feliĉan mĉenon junpatran kaj paŝis al la kliniko.

En la atendejo ili staris, la patroj, kaj ekscitite laŭdis la bonajn ecojn de siaj kelktagaĝaj gefiloj! La sonorigilo invitis nin al ĉambro, en kiu malantaŭ vitra vando la flegistinoj montris la novbakitajn homojn. Unu patro entuziasme kriis: „La mia jam ridas”, dum ke alia ne malpli entuziasme vokis: „La mia eĉ jam kan-

tas” (ploregis). Sed mi nur silente rigardis kaj konstatis ke beboj fakte sen distingo estus malbelaj estaĵoj. Tamen la flegistino diris al mi; ke „mia” infaneto estas eksterordinare bela, kaj - mi kapjesis.

Kiam mia bofilino salutis min jene: „Ĉu ĝi ne estas belega?” mi, malgraŭ mia koncepto, denove konfirmis tion. Post transdono de oranĝoj kaj bananoj mi aŭskultis duonan horon al ĉiaj detalaĵoj pri beboj kaj nun vere plene da fido povas atendi la estontecon!

Post la adiaŭo mi en la koridoro renkontis la saman flegistinon kaj ŝi emfaze ripetis: „Via filo, Sinjoro, estas vere eksterordinare bela!” Dirante „Ho jes” mi sentis min mizera, malica mensogulo!!

La saman vesperon mi ankoraŭ verkis ĉi tiun prozon, ĉar ĉi loke mi libere povas proklami ke, miaopinie, la plej malgrandaj homoj estas malbelaj!



VENU GRANDNOMBRE AL NIA JUBILEA I.J.K.!

Jus antaŭ la finpretigo de ĉi tiu L.J.V. atingis nin jenajn sciigojn de L.O.K.

La prepara laboro por nia 10a I.J.K. bone progresas. L.O.K. jam interrilatis kun diversaj oficialaj instancoj kaj de multaj flankoj ricevis promesojn kunlabori. Pratique jam kunlaboras la komunuma estraro de Hilversum, la Unuiĝo por Fremd-ultrafiko kaj la Nederlanda Ruĝa Kruco.

La fakto, ke ni festos nian dekan kiel jubilean I.J.K., klare respeguliĝas en la programo. En la festvespe-

roj kunlaboros i.a. 20 persona orkestro, dancorkestreto, kaj multaj individuaj artistoj. Por la dimanĉa programo (posttagmeze publika kunveno, vespere granda festvespero) ni invitos la Esperantistojn el la ĉirkaŭaĵo partopreni. L.O.K. jam mendis la aŭtobusojn por la granda tuttaga ekskurso kaj kontaktas kun la Nederlandaj Fervojoj por veturigi specialan vagonaron por la ekskurso al Amsterdam. El ĉi ĉio klare montriĝas, ke nia deka fariĝos grandioza.

R. K.

Sukcesa kulturpolitika renkontiĝo en Grésillon.

La Esperantista Kulturdomo Kastelo Grésillon estis dum la lasta semajno de la pasinta jaro la kunveno de proksimume 50 junaj gesamideanoj el Germanio, Francio kaj Anglio, renkontiĝintaj tie okaze de la internacia kulturpolitika renkontiĝo, organizita de Germana Esperanto-Junularo.

Tre riĉa programo plenigis la tagojn inter Kristnasko kaj Novjaro en Grésillon. Referatis i.a. f-ino Jeanne Dedieu, prezidantino de Groupe des Educateurs Espérantistes, pri „La franc-germana kultura interŝanĝo ek de la mezepoko”, Gerd J. Brinkmann, 1-a prezidanto de Germana Esperanto-Junularo, pri „La evoluo de la germana junularmovado”, Ewald Ebmeier, 2-a prezidanto de Germana Esperanto-Junularo, pri „Internacia Esperanto-literaturo kaj ĝia evoluo” kaj „La junularmovado Esperantista en Germanio”, Richard Reuchlin, 1-a sekretario de Germana Esperanto-Asocio, pri „Esperanto kaj la nuna politika situacio en Eŭropo”, Michel Schmidt pri „La situacio de

la hodiaŭa germana studentaro”, Margot Wietrzynski, prezidantino de Esperanto-Junularo Berlin, pri „Aktiveco de la junularo Esperantista en Berlin”.

Krome okazis diskutadoj pri diversaj Esperantistaj kaj junularaj problemoj kaj filmprelego pri vojaĝo tra Hispanio. Komprenoble ne mankis belaj ekskursoj per aŭtobuso kaj piede en la ĉirkaŭaĵoj de Baugé, vizitoj al kasteloj, katedraloj, muzeoj kaj ekspozicioj. En Angers la loka Esperanto-grupo aranĝis oficialan akcepton en la oficejo de la tiea Syndicat des Initiatives kun urbaj kaj junularaj reprezentantoj francaj. La gazetaro de la tuta regiono de Anjou preskaŭ ĉiutage favore raportis pri la kunveno kaj ĝiaj celoj.

Post la renkontiĝo en la Kulturdomo oni aranĝis dutagan restadon en Parizo, kie lokaj gesamideanoj gvidis la karavanon tra la urbo kaj al la vidindaĵoj de la franca metropolo.

SINJORINO LUMENA,

travidebla virino.

Dum restado en Germanujo - mi tiam estis franca membro de la Berlina Junular' Esperanto grupo! -, mi havis la plezuron renkonti strangan Sinjorinon, „Lumena”, kies kvalitoj ja estas originalaj.

Efektive, la ostaro de Lumena estas el ... aluminio kaj ĝia karno estas el pleksiglaso, travidebla kaj polurita. Dek kilometrojn da bluaj kaj ruĝaj fadenoj reprezentas vejnojn kaj arteriojn, ĝiaj organoj povas esti

aparte lumigataj kaj sammomente, oni aŭdas la registritajn klarigojn de fakulo, kiu priskribas ilin detale.

Tiu medicina modelo estas la rezulto de longdaŭra laboro de scienlistoj, artistoj kaj teknikistoj. Ĝi jam vojaĝis al diversaj eŭropaj urboj kaj oni eĉ filmis ĝin por la kinejaj aktualaĵoj. Ĉu vi ne pensas, ke ĝi plene meritas tiun sukceson?

Lucien Giloteaux, Francujo.

Mia temo estas: „La tri homoj de mia generacio kiuj plej profunde impresis kaj inspiris min.” **Zamenhof** estas unu, sed ĉar vi konas lin bone mi silentas pri liaj ideoj idealoj. La duo homo estas **Gandhi**. Antaŭlonge Mahometana misiisto rekomendis sian religion al mi en la vortoj: „Jesu-Kristo mortis kiam li estis juna viro. Mohammed atingis maljunecon, do en saĝo kaj sankteco li akiris multe pli maturecon, kaj sekve estas pli inda de via fido.” Mi hazardas la opinion herezan ke en Gandhi ni vidas Kriston kiel maljunulo tutreliefe. Mi ne aludas kompreneble al reen-karniĝo.

Ifoje Gandhi asekuris sian vivon sed poste li bedaŭris la paŝon kaj diris ke la ago rabis lian edzinon kaj infanojn de memfido kaj montris mankon de fido en Dio. Gandhi fidis forte en fastado kaj diris: „Ni uzas niajn okulojn por la ekstera mondo sed la fasto provizas okulojn por la interna mondo.” Li konfesis, „Mi neniam sentas min tiel feliĉa kiel dum fastado por la spirito.” Por tiuj kiuj ne povas fasti facile, li rekomendas manĝadon nur en medicinaj dozoj. „Dum multa laboro” li diris, „manĝu malmulte.” Laŭ Gandhi, oni ne povas posedi bonan sanon sen freŝa frukto, do li rekomendis, kiel vera ekonomo, la malŝparan elspezon aĉetadante frukton. Ĉiu persono, li diris, havas la rajton kaj deziron vivi 125 jarojn.

Gandhi vivis en kota dometo en vilaĝeto sen telefono, sen radio, sen

elektro, sen kuranta akvo. Li diris ke troaj pezaj zorgoj pri la estonto estas ateismo, kaj ke algluiĝo al posedadoj estas rezulto de timo. Sentimeco, li diris, estis la reĝo de virtoj.

Albert Schweitzer estas mia tria heroo. Li estas doktoro kvarfoje, nome filozofia doktoro, teologia doktoro, muzika doktoro kaj medicina doktoro. Interalie li verkis „La filozofio de civilizo,” „La civilizo kaj etikoj,” „La serĉado de la historia Jesuo,” „Johann Sebastian Bach,” „Goethe,” „De la primitiva foresto,” „De mia Afrika notlibro.”

„La granda eraro de etiko ĝis nun” Schweitzer diris, „estas ke ĝi traktis nur la rilatojn de homo al homo, sed homo estas plej vere etika nur kiam ĉiu vivo estas rigardata kiel sankta, ĉu la vivo de plantoj aŭ bestoj aŭ homoj.” Estas bone teni kaj kuraĝigi vivon kaj malbone detruai aŭ malhelpi ĝin.” Kolego en Afrika raportas ke kiam oni portas pampelmon al Schweitzer dum lia nokta laboro, li ĉiam lasas fali plenkuleron de la suko sur la plankon por ke la formikoj partoprenu. „Alrigardu miajn formikojn” li diras, „Ili similas bovinojn ĉirkaŭ laĝeto.”

„Tiu homo estas vere etika” Schweitzer skribis, kiu ne frakasas glacian kristalon brilantan en la suno, kiu ne deŝiras folion de arbo, kiu ne detranĉas floron de planto Esence amo estas kompatado kaj kiam ni kompatemiĝas, la purigado de niaj vivoj efektive komenciĝas.”

Ni kore gratulas al

gesroj Koopmans-Schotanus kaj al Roeleka en Hilversum, Malgranda Paradizo, Vosmaerlaan 3, pro la naskiĝo de Ieke Tine Donata.

24-31/7/1954.

Komenĉigis la jaro 1954a, la jaro de la deka I.J.K. de T.E.J.O. Nome de L.O.K. mi kore salutas vin ĉiujn kaj deziras al vi prosperan novjaron. Precipe ni esperas, ke ni povos en ĉi tiu jaro bonvenigi multajn geamikojn en nia pli-malpli jubilea kongreso en Hilversum.

JUBILEA KONGRESO? Jes, ĉar kvankam nia organizo ekzistas jam pli longe ol dek jarojn, tamen, pro la interrompo dum la militaj jaroj, ĉi somere por la deka fojo kunvenos esperantistaj junuloj el pluraj landoj en niaj unikaj kongresoj. Fakto, pri kiu ni rajtas fieri kaj fakto, kiun ni devas festi per granda demonstracio de la interna forto de T.E.J.O., de la forta ligo kiu tiras nin ĉiujare al la kongresoj. L.O.K. vidas kiel sian taskon ebligi al la T.E.J.O. membraro celebri la dekan feston de internacia amikeco junulara en grandioza IJK, kiu laŭ programo kaj nombro da partoprenontoj superos ĉiujn antaŭajn kongresojn de T.E.J.O.

Sed precipe al vi estas la tasko obliĝi al L.O.K. realigi siajn intencojn. Tion vi povas fari per frua kaj multnombra aliĝo. Tion vi povas fari per preparo de programeroj por la festvesperoj de la kongreso. Kaj nepre vi faru tion per plifortigo de via scio pri Esperanto. La nederlanda esperantista junularmovado jam ek-laboris por vaste konigi la okazigon de la T.E.J.O. kongreso en Hilversum, kaj se niaj nederlandaj amikoj sukcese aktivos, tiam gazetaro kaj junular-movadoj atentos kaj observos nian I.J.K. Al vi la tasko malpravigi la eldiron de kontraŭpropagandisto de Esperanto, kiu asertis en granda ĵurnalo, ke la plimulto el la t.n. Esperantistoj nur balbute parolas la lingvon!

Ĉi sube sekvas kelkaj komunikoj kaj sciindaĵoj el kiu vi konstatas, ke jam L.O.K. ekaktivis kaj rikoltis iom da sukceso. Ne prokrastu vian decidon sed senhezite plenumu la aliĝilon. Ĉar ankaŭ al vi ni diras:

KORAN BONVENON AL LA DEKA T.E.J.O. FESTO EN HILVERSUM.

Pri la Loka Organiza Komitato:

Pro diversaj motivoj ni decidis uzi por L.O.K. nur unu centran adreson, kiun vi povas uzi por ĉiaj korespondadoj pri la I.J.K. ĝi estas: **LOBELIASTRAAT 4, HILVERSUM, NEDERLANDO.**

Eksterlandanoj povos direkti siajn pagojn al nia bankkonto: je la nomo de S.ro Jorksveld, Kasisto 10a Internacia Junularkongreso de T.E.J.O., **NEDERLANDSE HANDEL MIJ, AGENTSCHAP HILVERSUM, NEDERLANDO.**

Nederlandanoj kompreneble ankaŭ povas uzi nian bankkonton, sed ili preferu pagu per la ĝirkonto nro 328587 de nia banko.

Honora Komitato:

L.O.K. sendis invitojn al diversaj eminentuloj en Nederlando akcepti lokon en la Honora Komitato. Kvankam la komitato ne jam definitive formiĝis, ni tamen povas sciigi, ke en ĝi kunsidos la **Ĉefministro de Nederlando, D.ro W. Drees**, kiu jam multajn jarojn estas esperantisto.

Rekomenda Komitato: Jenaj personoj deklaris sin pretaj esti membroj de la Rekomenda Komitato por nia I.J.K.:

Dr W. Drees, Ministro-prezidanto de Nederlando, Den Haag.

Prof. Dr M. J. Sirks, Direktoro Genetika Instituto, Groningen.

Dr W. Manders, Profesoro de Gim-

nazio, membro de la Akademio de Esperanto, Almelo.

Kunlaboro de aliaj instancoj:

L.O.K. jam ricevis subvencio de la komunuma estraro de Hilversum, en la formo de malplialtigo de la luprezo de la kongresejo per 50%. Ankaŭ la komunuma oficisto por sporto kaj korpa edukado kunlaboris por solvi kelkajn gravajn malfacilaĵojn.

Ankaŭ la Unuiĝo por Fremdultrafiko en Hilversum subtenas nian laboron; i.a. la kliŝoj, kiujn ni uzas, estas senpage disponitaj al ni de ĉi tiu unuiĝo.

Inter la esperantistoj en Bussum jam okazis monkolekto por subteni la I.J.K.

Pri la kongresejo: Ni restados en la hilversumaj Sporthaloj kaj la al ĝi ligita restoracio. En la haloj ni aranĝos bonan amasloĝejon, la manĝado okazos en la restoracio kaj en granda salono ni okazigos niajn kunvenojn kaj festvesperojn. Ni garantias bonajn litojn kaj pajlomatracojn, krome ni prunteprenos litkovrilojn de la Ruĝa Kruco. Oni mem zorgu por litotolaloj.

Pri la programo:

Aldone al la sciigoj pri la programoj en la antaŭa L.J.V. ni sciigas, ke ni okazigos sportan matenon kaj paroladkonkurson. Pluraj komunikoj ankoraŭ sekvas. Tamen volu jam nun klare respondi la ĉi-rilatajn demandojn sur la aliĝilo.

Pri aliĝoj:

En la januaro numero de L.J.V. vi trovis Inviton kaj aliĝilon. Bonvolu ĝin baldaŭ plenigi kaj forsendi. Nederlandanoj sendu sian aliĝilon kaj ankaŭ pagu la aliĝmonon rekte al

L.O.K., alilandanoj sendu aliĝilon kaj monon nur al la nacia peranto! Sen samtempa pago de la aliĝmono la aliĝo ne validas!

Ne plu prokrastu vian aliĝon al nia deka. La programo estas multpromesa, la situo de la kongresurbo tre favora. La postuloj por povi partopreni estas nur modestaj: Oni estu aŭ sentu sin juna kaj parolu Esperanton. Se vi deziras informojn aŭ havas specialajn malfacilaĵojn, skribu al la Loka Organiza Komitato, Lobe-
liastraat 4, Hilversum.

Ne nur T.E.J.O. membroj estas bonvenaj! Se vi havas esperantistajn amikojn aŭ konatulojn, varbu ilin por nia kongreso. L.O.K. sendos al vi tiom da aliĝiloj, kiom vi bezonas. L.O.K. zorgos, ke la programo estis neforgesebla, via tasko estas zorgi, ke la nombro da partoprenontoj estis grandioza.

Jam ni ricevis sciigojn el Anglio, Jugo-Slavio kaj Germanio, ke oni ekpreparas karavanojn. Ankaŭ en Nederlando jam pluraj junaj Esperantistoj promesis partopreni nian dekan I.J.K. Ankaŭ vi eklaboru! Landaj kaj urbaj perantoj aŭ grupgvidantoj ekkontaktu kun L.O.K. pri la aranĝo de karavanoj al Hilversum. Sciigu viajn esperantistajn amikojn-ne-T.E.J.O. membrojn pri nia kongreso kaj varbu ilin.

Se vi havas demandojn, deziras informojn k.t.p. tuj direktu vin al L.O.K. Nepre ne prokrastu, ĉar jam nun estas necese, ke ni havu bildon pri la nombro da partoprenontoj kaj iliaj specialaj deziroj. Agu tuj, ĉar

NIA DEKA ESTU GRANDIOZA!

Roel Kraefft.

Loka Organiza Komitato,
Lobeliastraat 4,
HILVERSUM, Nederlando.

Por la infanoj en la mondo skribita de japanaj infanoj.

Sub ĉi tiu titolo eldonis la Infana fako de Redakcio en Heybon-Sya K.K. № 4. Yomban-tyo, Tiyoda-ku, Tokio, Japanujo legolibroeton por la infanoj. „La japanaj infanoj estis longe izolitaj de la tutmonda vivo. Tio estas granda malfeliĉo ne nur por ili, sed ankaŭ por la tuta mondo. Nun ili deziregas scii la tutmondan vivon.

Ili deziras „kunsenti“, „kunlabori“ kaj „kunvivi“, kun la gefratoj tutmonda, por efektive fariĝi novaj indaj anoj de la homaro. En nuna Japanujo disvolviĝas notinda nova edukado per „Verkado de Infanoj“. Tiu ĉi nova edukado montras mirindan sukceson disvolvigante la observokaj esprimkapablojn de infanoj. Per interŝanĝo aŭ publikigo de „verkoj infanaĵ“ ili pli bone komprenas sin mem kaj konatiĝas kun nekonataj kolegoj, pliriĉigas siajn sciojn kaj fratecajn sentojn. Per tiu ĉi edukado ankaŭ pliprofundiĝas interkompreno kaj amo inter infanoj kaj maturaj homoj, jen estas grava signifo de la nova edukado. Tial tiu ĉi movado ĉiam pli alte taksate disvolviĝas tra tuta Japanujo. Nun el ĝiaj legantoj kaj kunlaborantoj aŭdiĝas voĉoj: Faru tiel same sur la tuta mondo per infanaĵ manoj!

Jen sincera deziro de japanaj infanoj, gepatroj, edukistoj:

- Kiel en ĉiu lando de la mondo, gefratoj infanoj lernas, ludas, laboras kaj pensas? Kiel gefratoj en la lando, kiun ni nur povis malklare imagi, vivas ĉiutage, en hejmo, en lernejo, en parko, en kamparo, aŭ en aliaj realaj medioj? Niaj infanoj volas aliĝi al via vivo, kaj aliĝi vin al nia vivo; unuvorte kunvivi kaj kunlabori kun vi. Ni tutkora esperas kaj atendas vian afablan kunlaboradon.”

La projektita libro „Infanoj en la Mondo“ enhavos verkojn faritajn de infanoj: skribaĵojn pri sia vivo, pri sia lando kaj popolo, poemojn, dramojn, rakontojn, ktp. Desegnaĵojn, fotografaĵojn, gravuraĵojn, lignografojn, manlaboraĵojn, komponaĵojn. Por infanoj: ŝatatajn kantojn, rakontojn, historiojn, bonajn literaturaĵojn belartojn, fotografaĵojn pri kaj por

infanoj. Priskribon pri infana vivo, pri lando kaj popolo por infanoj, ktp. La projektita libro eldoniĝas unue en japana lingvo por japana infanaro en 1954 kaj esperebla due en Esp. por tutmonda infanaro.

Maniero de kunlaborado: Por ke ĉi tiu afero akiru kiel eble plej vastan subtenon kaj kunlaboron, bonvolu diskonigi ĝin en ĉiu ebla okazo, en viaj ĵurnaloj, kunsidoj, societoj, en viaj lernejoj kaj hejmoj. Ni atendas viajn fervorajn komunikojn, kunlaborojn, individuajn kaj organizitajn. Por plivastigi kaj pliefikigi la kunlaboradon dezirinde estas, ke la fervoraj homoj formos ĉirkaŭ si kunlaboran grupon, aŭ en difinita loko, aŭ en societo kaj elektinte reprezentanton komunikados kun ni. Pri tempolimo kaj aliaj detaloj koncerne la redaktadon poste ni aparte informos laŭ la landoj. Tamen jam tre dezirinde vi bonvolu tuj komenci kunlaboradon per diskonigo, komunikado, informado kaj alsendado de materialoj. Atente ĉiuspecajn subtenojn kaj helpojn de tutmondaj infanamiĉoj, ankaŭ ni nin pretigas kiel eble plej signifoplene rekompenci ilin laŭ jena maniero.

1. Al ĉiuj komunikantoj kaj alsendantoj de skribaĵoj ni sendos niajn presajojn kaj kunlaborate de japanaj edukistaj organizoj, klopodos servi por interŝanĝo de informoj pri infana vivo.

2. Por la skribaĵoj akceptitaj en nia projektita libro, ni sendos rekompence la eldonotan libron al ĉiu skribinto kaj ĝia gvidinta instruisto.

3. Kontraŭ ĉiuj senditaj materialoj, bildoj, libroj, fotoj, ktp. ni sendos kiel eble egalvalorajn objektojn laŭ la deziro, bildojn, librojn ktp. aŭ la pagon (per respondkupono, Unesco kupono, k.s.).

Adreso: Infana Fako de Redakcio en Heibon-sha, No 4. Yombantyo (Kozimati), Tiyado-ku, Tokio, Japanujo.

(En la nuna nro de LJV vi trovos legajojn el la supre menciita libro. Ĝi nepre estas interesa kaj valora provo. Ni deziras al la iniciantoj multe da sukceso).

Sur la urba muro de Dubrovnik.

Post la pasintjaraj internaciaj kongreso de UEA kaj studenta konferenco de IFESA, mi faris rondvojaĝon en Jugoslavio. Inter alie mi vizitis dalmatian urbon Dubrovnik, kiu situas tre bele ĉe Adriatika maro. En jena artikoleto mi priskribos rondiradon sur la impona muro, kiu ĉirkaŭas la tutan urbon, - almenaŭ ĝian malnovan parton.

En iu malfrua posttagmezo mi surgrimpis unu el la mallarĝaj ŝtuparoj, kiuj kondukas al la supro de l'urba muro. Oni jam rekomendis al mi tiun viziton. Tamen mi haltis tute surprizita. Grandioza vidaĵo kaptis miajn sensojn: Sub mi etendiĝis Dubrovnik kun siaj stratetoj kaj blanke grizaj domoj. Ekstere sur boskaj deklivoj grupis kelkaj novaj konstruaĵoj, -kaj tie, en la kvietaj, blua maro, preskaŭ atingebla, jen Lokrum, paradiza insulo, kie kantas cikadoj sur sveltaj cipresoj kaj graciaj pinioj; kie spicas la aeron forta, dolĉaodoro de ekzotaj plantoj.

La urba muro estas tre dika. Kelkloke estas ĉe estradoj, kaj ŝtuparoj kondukas al neatenditaj anguloj kun novaj surprizoj. Kiajn sekretojn kaŝas tiuj ŝtonoj? Certe ili povus multe rakonti pri dramoj prezentitaj de urbaj defendantoj, kiam de l'murpintoj ili penis distancigi sangosoifajn atakantojn. Nun regas paco, kvieto.

En iu loko mankis kelkaj ŝtonoj. Aŭdace mi rampis ĝis la rando por ĵeti rigardon en la profundajon. Malsupre ŝoseo premiĝis inter la muro kaj kruta roko. Svena alteco! Falo signifus morton! Mi reserĉis sekurecon kaj pluiris malrapide, turnante min al la urbo mem. Denove mi de-

vis ripeti, ke Dubrovnik superas ĉion, kion mi ĝis nun vidis! Ĝi estas kiel vivanta muzeo. La arkitektura stilo estas agrable homogena, kaj kvankam la domoj aĝas multajn jarcentojn, ili ŝajnas surprize bone konservitaj. Kaj vivaj homoj loĝas tie. Ili sidas sur sojloj aŭ taburetoj kiel viglaj kolormotivoj en la ŝtona grizo, babilante kun najbaro aŭ pretigante legomojn. De ĉisupre oni bone povas studi familian vivon.

En monaheja ĝardeno promenas du katolikaj pastroj. La koloro de iliaj haroj estas same nigra kiel la longa, digna robo. Malrapide, silente ili iras kaj reiras - kun klinitaj kapoj - ŝajne okupitaj de serioza meditado.

La suno sendas siajn lastajn radiojn sur la maron, ruĝigas la horizonton, kvazaŭ ĝi flustrus al ĝi dolĉajn sekretojn. Ĉe la mura malsupro, kiu okcidente krute atingas la maron, movetas sin ondoj amike ĉirkaŭ ŝtonoj. Plenpulte mi enspiras la mildan, freŝan aeron.

Sono de blovinstrumento vokis subite miajn orelojn al atento. Certe, tio estis muziko de Bach! En fremda, malproksima lando estis tamen io, kio ne estis fremda! Mi ekĝojis, serĉis la domon, de kie venis la sono, trovis ĝin kaj restis tie, rigardante tra fenestro la ludantan knabon. Tiom intense mi aŭskultis, ke mi eĉ ne rimarkis la mallumon, kiu jam baris la vidon al maro kaj pejzaĝo. Sed fine ĉesis la muziko, kaj mi ekiris, sekvis la murrandon, malsupren-palpis laŭ mallarĝaj, nigraj ŝtuparoj, ĝis kiam denove mi staris en antikvaj stratoj de Dubrovnik.

Birthe Trærup,
jan. 1954.

Venu kaj venigu aliajn al la elstara festeno de la junesperantistaro, la deka internacia junular-kunveno de T.E.J.O.



esperanton radías..

Listo de radiodissendoj en aŭ pri Esperanto. Tempindiko: M.E.T. (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Belgujo, Nederlando kaj Svisujo. Mallongigoj: I = informoj. P = paroladeto. K = kurso. M = muziko.

LUNDE:

- 19.30—20.00 La Coruña (Hispanujo), 250 m.: P kaj K.
22.35—22.40 Vieno I, 25,46 m., 48,75 m., 513 m.: P.
23.15—23.30 Hilversumo II, N.R.C.V., 298 m., 188 m.: P kaj M: „La Evangelio en Esperanto”. (Nur unufoje monate).

MARDE:

- 12.55—13.00 Berno, 16,87 m., 31,46 m., 48,66 m., 75,28 m.: P de d-ro Arthur Baur.
15.30—15.45 Montevideo (Urugvajo), 280 m.: P (nur la unua mardo de ĉiu monato).
16.00—16.15 Vieno II, 25 m., 30 m., 41 m., 48 m., 203 m.: P.
18.35—18.40 Berno, 16,87 m., 31,46 m., 48,66 m., 75,28 m.: Ripeto de posttagmeza P.
23.30—24.00 Valencio (Hispanujo), 200 m.: P.

MERKREDE:

- 16.45—17.00 Graz (Aŭstrujo), 417,2 m.: K (nur ĉiudusemajne).
17.00—17.10 Caramulo (Portugalujo), 205 m.: P de Alfredo Sales.
20.30—20.45 Barcelono, 360 m.: P „La voĉo de la mondo”.
23.15—23.20 Hilversumo I, 402 m., V.A.R.A.: I.

JAŬDE:

- 08.30—08.35 Rijssel (Lille), 218 m.: P de prof. Labit.
09.30—09.45 Parizo, 348 m.: K de Pierre Delaire, Orléans.
12.55—13.00 Berno, 16,87 m., 31,46 m., 48,66 m., 75,28 m.: P de prof. d-ro E. Privat.
18.35—18.40 Berno, 16,87 m., 31,46 m., 48,66 m., 75,28 m.: Ripeto de posttagmeza P.

VENDREDE:

- 18.50—19.10 Romo, 31,35 m., 49,92 m.: P de prof. d-ro V. Musella.

SABATE:


- 09.30—10.00 Rio de Janeiro, 30,71 m., 375 m.: K kaj I.
23.15—23.20 Hilversumo II, 298 m., 188 m., K.R.O.: I.

Informoj kaj petoj:

Bone konservu ĉi-supran liston! — Pro spacomanko ni ne povas en ĉiu numero aperigi ĝin. Nur kiam estos gravaj modifoj, ni informos niajn legantojn, al kiuj ni deziras bonan kaj oftan Esperantoradioaŭskultadon (kia vorto!) en 1954-a!

Radio Roma. — Jen detaloj pri programoj en febr. 1954: 3/II: Novaĵoj el Italujo. 5/II: La kultura valoro de Esperanto ĉe la radio kun aparta konsidero pri Radio Roma. 10/II: Florencaj kanzonoj. 12/II: Respondoj al la geaŭskultantoj sendintaj leteron kaj bibliografio. 17/II: Sardino, la insulo de la 26-a itala Esp.-kongreso. 19/II: Italaj belartaj urboj: Napoli. 24/II: Poeto Govoni — premio Marzotto 1935. 26/II: Karnavala parentezo. Adresu skribajn aplaŭdojn al Radio Roma, Castella postale n-ro 320, ROMA (Italujo). De aliaj stacioj ni ne ricevis detalojn.

Informojn pri Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TIERKWERD (Fr.), Nederlando.



KORESPOND- ADRESOJ

Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Germanujo: Sro A. Neussner, Berlin-Lübars, Taubengasse 46, dez. interŝ. poŝtm. kaj alumetuj-etikedojn tutmonde.

Germanujo: Sro R. Koch, Mühlheim/Kobl. Kapellenstr. 14, dez. amik. koresp. kun nederl. gesam. Nevre respondos.

Facilaj legajoj.

Milito:

Miŭa-Takamicu (9 j. knabo).

Homoj, kiuj iris al milito,
Kaj perdis unu kruron,
aŭ perdis unu brakon,
ĉiam en tramo petas monon.
Kiam mi renkontas ilin,
Mi mallevas mian vizaĝon,
Mi eklarmas.
En mia poŝto
Mi havas nek unu senon.
Ial
Mi estas malgaja, kvazaŭ sonĝo.

(seno estas la plej malgranda monero ĝi valoras 1 spesdekon).

Mia noktlaboro.

Abe-Heizo (9 j. knabo).

Adaptita por LJV.

En vintro homoj faras sandalojn, matojn ktp. el pajlo. Ili vendas tiujn por akiri monon. Ankaŭ mia patro volas iom pergajni. Mi helpas lin dum la noktaj horoj. El la pajlo mi forigas la nodojn. La lampo estas apud la patrino. Mi pro mallumo penegas labori. Ekster la domo hejmen rapidas laborantoj. Kiam ni finos ĉi tiun laboron, patrino fritos por ni fritajon. Estos dolĉe! En la fornon mi enjetas arbitradikojn. Ĝi vikle brulas kaj fumas. Patro plektas pajlomantelon. Ĝi baldaŭ estos preta. Mi rapidas, miaj manoj doloras. La laboron mi ne povas bone plenumi. Mi devas ŝiri nodojn de dek faskoj plu. Tutkore mi deziras ĝin rapide fini.

la burgono



MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ



Kaptila fosajo (enfalejo).

Ozeki-Macusaburo (10 j. knabo).

Ĉe Sakue-don staras kelkaj homoj. Do mi kuris tien. *Jasuharu* fosadis kavon per ŝovelilo. *Magoiči* jam elfosis profundan fosajon. Liaj manoj estis malvarmaj. Li tenis ilin bruste en vesto. Al *Kaŝizo* li rigardis kaj ridis per la okuloj.

— Kion vi faras nun? mi demandis. *Jasuharu* eksplodis en ridego. Li montris al malgranda pinarbo. Kun neĝbulo en la mano li demandis:

— *Macusaburo*, ĉu vi povas trafi la neĝbulon al tiu pinarbo? Kaj li ĵetis la neĝbulon. Ĝi bone trafis. Blanka postsigno de la neĝo restis sur la pinarbo.

— Ha, ha, ha, ha! ridis ĉiuj.

— Tia afero estas tute facila! mi diris. Mi vigle paŝis per la maldekstra piedo antaŭen. Kun forto mi ĝin metis sur teron. Jen, mi enfalis, ja bele!

La knaboj ĝuste tion atendis. Ili ridegis en unu laŭta voĉo.

— Ua, ha, ha ...

Kaŝizo diris al mi:

— Ĉu tio ne doloras al vi brava *Macu*?

Kaj li kun laŭta voĉo ridis: Ah, ha, ha!

Jasu kaj Mago ankaŭ ridis: Ijaŭji, ijaŭi!

Mi eksidis. Elĵetis miajn krurojn. Mi komprenis, ke ili fosadis kavojn por fari enfalejon.

Hae kaj *Jasuharu* ankaŭ elfosis fosajon kaj nun surmetas malgrandajn branĉojn kaj komencas kovri ilin per neĝo maldense.

Ankaŭ *Magoiči* komencis kovri la fosajon. Li ne havis ŝovelilon. Li per la manoj ŝovas apudan neĝamason kaj fermas la foson.

La fosoj estas fermitaj. Ili lekas siajn manojn kaj ĉirkaŭrigardas kun petola mieno: Kiu tuj poste enfalos?

Kaŝizo nun kovras la fosajon en kiu mi enfalis. Ankaŭ mi volis helpi.

Mi iris unu paŝon, jen mi denove enfalis en foson, kiun faris *Jasuharu*.

— Aha, ha! ridis li kaj tuj komencis kovri ĝin.

Ĉiuj jam kovris siajn proprajn fosaĵojn. *Mago* ankoraŭ ne kovris la sian.

Mi vidis *Hideon Miĉijan* veni kun infano el mia domo. Mi rapide diris:

— Hej, *Mago* rapide kovru la foson. Jen venas *Hide* kaj aliaj.

Mago estis embarasita. Li apenaŭ finis kovri ĝin, kiam *Hide* kaj la aliaj jam alvenis ĝis la persimona arbo ĉe *Sakue-don*.

Mago starigis unu arbobranĉon en la mezo de la kaptilfosaĵo.

Tiam *Hide* kaj aliaj alvenis al ni.

Mago parolis al ili:

— *Hide*, ĉu vi povas eltiri tiun arbobranĉon el la tero? Mi ne povas, kiel ajn mi provis eltiri.

Mi sentis tion tre ridiga, preskaŭ ne elportebla. Mi kun granda peno subpremis mian ridon kaj ridis nur per la okuloj.

Hide singardeme ĉirkaŭrigardis. Li trovis fendeton, kiun *Mago* ne plene kovris kaj diris:

— Jen, ĝi estas kaptilfosaĵo! Vi min trompas tute vane!

Kaj jam tio fariĝis senamuza. Ni ĉiuj alsaltis al la kaptilfosoj, kiujn ni mem fosis. Kaj ni ŝtopis ilin.

Ni diris:

— Jam ni iru hejmen!

Ĉiuj ekpaŝis. Subite tiam *Mago* enfalis „trafe” en la kaptilon. Ni pro surprizo ĉiuj denove ridegis kaj preskaŭ saltis.

(Adaptita por LJV).

Balaado de la neĝo.

Kaŭai-Kazuo (13 j. knabo).

— Hej!

Vokojn kaj revokojn tra la tuta vilaĝo oni aŭdas. Eĥo resonas de montoj al montoj.

— Ĉiuj elvenu!

— Kiuj kvazaŭ meloj restas ĉe litforno?

Je la dua voko niaj kolegoj el interno de malhelaj domoj elsaltas unu post alia. Ili estas konfuzitaj, frotas al si la orelojn. Tio estas komika. Kaj ĉiuj laŭte ridas: A, ha, ha! Nu, ni iru!

Estas dimanĉo hodiaŭ, la tago de neĝbalaado de nia branĉlernejo. Mi kaj Ĉieĉjo marŝas la unuaj. Sro Cuĉino, nia instruisto sin montras el fenestro: Dankon por via laboro!

(En neĝoplenaj provincoj la homoj devas forbalai la neĝon de la tegmentoj. La neĝo estas peza, ĝi tre ŝarĝas la tegmentojn. La tegmentojn de la lernejo balaas la infanoj dimanĉe).